

Claude kaj Andrée GACOND: Leterkesto

Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI, 1986.02.06

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-162/Radiokasedo-162-3-86-B-1012-Claude-kaj-Andree-GACOND-Leterkesto.mp3>

Cl.- Parolas gesinjoroj Claude kaj Andrée GACOND nome de Svisa Radio Internacia. Hodiaŭ ni daŭrigas nian respondadon al la leteroj, kiujn ni ricevis dum la pasinta jaro. Ĉifoje ni elektis kiel labormetodon la tutsimplan alfabetan ordon de la skribintoj. Ni troviĝas en la fako E. El Brazilo ni ricevis la sciigon, ke nia aŭskultanto Hermas PITTA mortis. Li prezidis la Esperantan Studgrupon "Zamenhof" en SALVADOR, Brazilo, kaj la koncernaj grupanoj esperas daŭre ricevi la informilon de Svisa Radio Internacia. La orientitaj elsendoj tutcerte faciligos al ili la aŭskulton de niaj radio-programoj. El Germanio s-ro pastro Bernhard EICHKORN en Messkirch skribis:

A.- "Vi scias, ke mi estas ofta aŭdanto de Svisa Radio Internacia. Kompreneble mi povus aŭdi multajn germanlingvajn elsendojn de multaj radiostacioj, sed mia ĝojo kompreni almenaŭ unu negermanan lingvon - la esperantan - instigas min aŭdi precipe viajn elsendojn."

Cl.- Tutcerte multaj aŭdantoj havas la saman sintenon. S-ino Gertrud EGGENBERGER en Wintherthur, Svislando, petis 20 radioprogramojn por ilin disdoni al esperanto-fervojistoj. Ŝi estas la prezidantino de Svisa Asocio de Esperanto-Fervojistoj. S-ro Ervin FENYVESI en Budapeŝt (Hungario) skribis:

A.- "Mi denove aŭskultis vian interesan prelegon, nun ĵaŭde pri ADA kun agrabla voĉo kaj multaj indikoj. Mi estas profesie historio-profesoro. "

Cl.- Ni ankaŭ salutu s-ron Berthold FISCHER en Westerland, kaj Josef FISCHER en Nordwalde, ambaŭ en Germanio okcidenta kaj s-ron Gustave FRAIKIN en Bruselo, Belgio. El Francio s-ro Lucien GILOTEAU en Croix skribis :

A.- "Ne eblas al mi aŭskulti ĉiujn viajn elsendojn, sed kiam mi aŭdas unu el viaj programoj mi ĉiam lernas ion novan..."

Cl.- S-ro Lucien GILOTEAU akompane al siaj leteroj havigas al ni gazetteltranĉaĵojn, kiuj ankaŭ ĉiam lernigas al ni ion novan. En Svislando ni salutu s-ron Malte GIOVANOLI en Lausanne. S-ro D. B. GREGOR en Northampton (Britio) ankaŭ aŭskultas la elsendojn en la romanca lingvo de Svisa Radio Internacia. El Usono venis aŭdraportoj de s-ino Gretchen DORIS en Tampa. Ni citu el la letero de E. GUILLEMAU en Bouloc (Francio):

A.- "Depost du monatoj mi tute ne povis kapti la esperanto-dissendojn de Bern. Tion mi ne komprenis, ĉar kutime ĝi estis horloĝe akurata. Antaŭ kelkaj tagoj esperanto-kamarado al kiu mi rakontis la aferon pri Svisa Radio diris al mi: "Vi ne legis "Sennaciulo"n en la monato junio. Oni parolis pri tio. Draste oni ŝanĝis la horaron. Skribu tuj kaj petu la informilon. Mi ŝatas vin aŭskulti, la temoj estas interesaj kaj diversaj. Bedaŭrinde ne daŭras sufiĉe laŭ mia opinio, necesus duona horo, ĉu eblas? Ĉu la aŭskultantoj povas helpi? Mi pensas pri la centjara jubileo kaj la sekvo."

Cl.- La plej granda helpo, kiun oni povas fari, por plilongigi kaj plioftigi la esperanto-elsendojn ĉe radio-stacioj, estas skribi pri sia regula aŭdado, kiel faris tiuj, kiujn ni hodiaŭ

salutas. Unu el tiuj salutoj sendis Hispana Esperanto-Instituto en Barcelono. El Francio s-ro Daniel HOUGUET en Guerande sendis al ni informojn pri la luktoj por la unueco de Bretonio. Ni citu lin:

A.- Ekde la Tria Respubliko, Bretonaj lingvoj estis malpermesitaj en Bretonaj lernejoj. Post dekreto de la 30-a de junio 1941 de Petain, departemento Luaro-malsupra ne plu aniĝis Bretonion. La Kvina Respubliko kreis tute artefaritan regionon, sen historio, sen kultureco, sen ekonomika unueco: Les Pays-de-Loire (Luarlandoj) kunigante la departementojn Sarthe, Mayenne, Maine-et-Loire, Vendée, Loire-Atlantique. Nun iaj verkoj eĉ falsigas la efektivan historion por krei Luarlandan historion... De pluraj jaroj komitato por unueco administra de Bretonio batalas por ke Loire-Atlantique, departemento historie, kulture, kaj ekonomike bretona, religiĝu administre al la bretonia regiono, kiu oficiale kunigas kvar departementojn: Finistère, Côtes-du-Nord (Nordaj Marbordo) Morbihan (Mareto) kaj Ile-et-Vilaine."

Cl.- Estas bone memori de tempo al tempo al la francoj, ke Francio ne estas nur franclingva. Ekzistas en tiu lando lingvaj minoritatoj, kiuj ĝis nun ne akiris agnoskatecon. Estas tute normale, ke esperantistoj intersiĝu pri la problemoj de lingvo-minoritatoj. La venontan someron okazos en La Chaux-de-Fonds seminario pri la lingvo-minoritatoj en Eŭropo. Ĝi donos la eblecon akiri klaran ideon pri la hodiaŭa situacio. En Pollando ni salutas nian aŭskultantinon Ludmila HUBCZENKO en Opolo. Ni diru bonan tagon al Richard ISOPP en Vieno, Aŭstrio kaj al Quirin IMELDI en Allauch, Francio, kiuj ankaŭ aŭskultas nacilingvajn elsendojn de Svisa Radio Internacia, do ne nur la esperantajn. Same faras multaj esperantistoj. Profesoro d-ro Horst KAUFMANN en Ludwigshafen, Germanio okcidenta skribis:

A.- "En via elsendo sabate la 7-an de septembro 1985 oni parolis pri moderna metedo de instruado de esperanto (ĉu evoluigita Cseh-Metodo?) Temas pri metodo preskaŭ kiel la generativa-transforma gramatiko, kaj ne analoga al la greka-latina gramatiko. Kie oni povas ricevi pli precizajn informojn?"

Cl.- Aliaj aŭskultantoj diris sian intereson pri tiu ĉi temo. Ni do dediĉos ree prelegaron al tiu nova maniero instrui esperanton, evitante ĉiajn tradiciajn gramatikajn terminojn. Anstataŭ paroli pri substantiva radiko oni diras ekzemple, o-ema-elemento, kaj oni konstatas, ke ĝi povas aliformiĝi. Tiam oni havas ekzemple as-forman o-elementon, aŭ a-forman o-elementon, kaj tiel plu. Eĉ la vorto akuzativo, kiu aperas en ĉiu esperanto-gramatiko montriĝas nenecesa, kiam oni opoziciigas la funkciojn subjekto kaj nesubjekto. Oni tiam konstatas, ke la subjektan funkcion karakterizas manko de marko, dum la nesubjektan funkcion karakterizas ĉu la marko "-n" ĉu lig-vorto kiel 'en', 'je', 'sur', ĉu la 'e'-finaĵo. La lernantoj multe pli facile komprenas tion, ol la klasikajn gramatikajn klarigojn, kaj tre rapide ili povas eviti la plej multon el la tradiciaj eraroj, kiujn ĝenerale faras la komencantoj, ĝuste ĉar la klasikaj klarigoj verŝajne ne bone respegulas la esperanto-sistemon. Tiun ĉi instru-metodikon oni disvolvas ĉe Kultura Centro Esperantista. Sed ĝis nun nenio estis publikigita pri ĝi.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Claude kaj Andrée GACOND diras: ĝis reaŭdo !